
*Esperanto-Numismatika Asocio*



**Esperanta Numismatiko** 2015 **Jarkolekto 2 - Numero 2**



# *E N H A V O T A B E L O*

***de aprilo 2015***


Titola paĝo …………………………………………………………... 1

Enhavotabelo ………………………………………………………… 2

De ni por … ni !……………………………………….……………….. 3

Moneroj & medaloj : ………………………………………………… 4

*Premio Ada Sikorska: la medalo*

*Honoriga monero por Bertha von Suttner (1843-1914)*

Spikumaĵoj kaj suplementoj: ………………………………………. 10

*Pri itala Esperanto Kongreso 1976*

*Pri la ora medalo 1912*

*Pri la helpa mono*

Historiaj aspektoj: Speso kiel grundo de eŭro (2)….………………….. 12

Retpoŝto ……………………………………………………………… 14

Anoncoj & Eventoj …………………………………………………… 29


Kunlaborintaj redaktoroj: Vi (ĉiuj)!

Finredaktado: Bert

# *De ni por … ni!*

Karaj ENA-anoj kaj aliaj legantoj.

Unuavice mi volas atentigi vin pri la ĉi-numera enhavo de "Moneroj kaj Medaloj". Vi tuj rimarkos, ke la ĉefroluloj sur la numismatikaĵoj ĉi-foje estas ĉefrolulinoj!

Finfine suriras la scenejon du filinoj de Evo, nome la neforgesebla Ada Sikorska-Fighiera, eternigita sur esperanta premio medalo kaj la aŭstra nobela virino grafino Bertha von Suttner, bedaŭrinde figurita nur sur naciaj monero, medalo kaj monbileto.

Ĉu ni per Esperanto ne pravege batalas por egaleco inter la popoloj? Kial do ne por egaleco inter virinoj kaj viroj? Esperantistinoj (ĉu ne SAMideaninoj?) ŝajnas daŭre esti retenitaj per vitra plafono, ankaŭ en Esperantujo!. La Sikorska-medalo estas la nura al mi konata numismatikaĵo kiu unuavice honorigas meritplenan samideaninon. Krome, el 11 premiitoj (2004-2014) nur 4 (!) estas samideaninoj (unu el la kvar kune kun viro!). Mi nun atendas de nia legantaro amason, eĉ cunamon da ekzemploj kiuj mantras, ke mi malpravas! Sukceson!

Por la "granda damo" kiu, kiel unua virino, ricevis la Premion Nobel de Paco, Bertha Von Suttern, neniam aperis sur memoriga esperanta medalo. Ĉu pro manko de mono, de ideoj, de intereso aŭ tutsimple ĉar ŝi estis "nur" virino?

Tamen, ekzistis, eĉ ekzistas, sufiĉe da esperantistinoj kiuj meritas minimume unun propran esperantan medalon. Ĉu en Esperantujo tute nekonataj estas ekzemple Klara Silbernik, Lidia Zamenhof, Julia C. Isbrücker, Marie Hankel, Verda Majo, Marjorie Boulton, Anna Löwenstein, Vida Jerman, Julia Pioro, ktp, ktp? Domaĝe…

Karaj kunlaborintoj de ĉi-numero, por ne forgesi eĉ unu nomon, mi preferas samtempe danki vin ĉiujn, kiuj iel kontribuis. La rubriko "Retpoŝte", danke montras viajn mesaĝojn, proponojn kaj aliajn meritojn.

Tamen mi volas aparte gratuli du kunlaborintinojn, unun el Trieste (Italio), alian britdevena, sed ankaŭ loĝanta en Italio.

Tiu lasta, la sukcesplena verkistino Anna Löwenstein, atentigis min tute prave pri eraro en la nomo de nia asocio. Mankis (ne plu mankos!) streketo inter *Esperanto* kaj *Numismatika*. Do ni skribu: "Esperanto-Numismatika Asocio", ĉar la streketo signifas ke ni ne okupiĝas pri ĝenerala, sed pri esperanta numismatiko.

Elda Dörfler el Trieste proponis al ni kunlaboron dum la UK en Lillo inter la filatelista asocio ELF-Arek, kies prezidantino ŝi estas, kaj ENA. Ni kune aktivos kaj propagandos i.a.en la Movada Foiro dum la inaŭgura tago de la jubilea UK 2015! En la "ombro" ni jam kelkfoje perrete interparolis kaj reciproke proponis kaj interŝanĝis diversajn ideojn.

Sendube tiu kunlaboro metos la avantaĝojn de solidareco inter kolektantoj en brilan lumon!

Bert

# *M O N E R O J & M E D A L O J*

## Tipo A 1 - Esperanto medaloj

### Premio Ada Sikorska: la medalo







Lando: Hispanio (Katalunio)

Kvanto: laste 20 (ĝis 2022)

Metalo: bronzo

Pezo: 150 gr

Diametro: 750 mm

Diko: 4 mm

Medalisto: nekonata

Jaro: ekde 2004 ĉiujare



ATESTO

LA JUĜKOMISIONO DE LA
20-a INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO
DE LA KULTURO KAJ TURISMO

ALJUĜAS LA PREMION ADA SIKORSKA FIGHIERA

AL SAMIDEANO

VILHELMO LUTERMANO

PRO LIA MULTJARA SINDEDIĈO KAJ MERITPLENA LABORO POR
ESPERANTO
KAJ POR ĜIAJ IDEALOJ

CAMBRIS 6/13-an de OKTOBRO 2012

LA SEKRETARIO

LA PREZIDANTO

# Premio Ada Sikorska Fighiera

La fama premio konsistas unuflanke el bronza medalo - kiu estas bedaŭrinde ne aĉetebla - aliflanke el atesto. La diametro estas 750 mm, eldonkvanto laste 20, pezo 150 gr, dikeco 4 mm.

Sur la medalo estas reliefa bildo de Ada kaj la vortoj: "Premio Ada Sirkorska Fighiera" kaj "Internacia Esperanto-Semajno". Dorse troviĝas la gravurita nomo de la premiito, dato kaj loko de la Semajno. La "Internacia Esperanto Semajno de la Kultuuro kaj Turismo" estas konata esperanta evento, kiu okazas ĉiujare en iu urbo de la kataluna Mediteranea marbordo.

La Premio Sikorska estis kreita en 2004, memore al Ada Sikorska, kiu naskiĝis en Pollando. Kiel edzino de Carlo Fighiera ŝi mortis en Italio. Sindediĉe dum 34 jaroj ŝi laboris por Esperanto.

La medalo estas ankaŭ destinita al vivantaj esperantistoj kiuj aparte distingiĝis pro sia valora kaj meritplena agado favore al la Internacia Lingvo.

JEN LA PREMIITOJ

| | | |
|---|---|---|
| 2004 | Augusto Casquero | Hispanio |
| 2005 | Raymont Boré | Francio |
| 2006 | Leo Lentaigne | Francio |
| 2007 | Antoni Marco | Hispanio |
| 2008 | Ragarsson Baldur | Islandio |
| 2009 | Katalin Kovats | Belgio(?) |
| 2010 | Rafaela Urueña | Hispanio |
| 2011 | Eugene de Zilar | Francio |
| 2012 | Vilhelmo Lutermano | Kubo |
| 2013 | Alicja Lewanderska | Pollando |
| 2014 | Trini Garcia / Joseph Colom | Hispanio |

# Ada Fighiera-Sikorska (1929 – 1996)



Ŝi vivis kaj studis en Varsovio ĝis la milit-eksplodo en 1939, kiam la lando estis atakata samtempe de Germanio kaj de Sovetunio. Tiam, la familio fuĝis al Lvovo (orienta Pollando), kiun la patro, generalo Sikorski, havis la taskon defendi. Post la kapitulaco de Pollando, la familio kun la pola civila loĝantaro estis internigita en Siberio, kie Ada vizitis rusan bazan lernejon: la patro, kune kun 10 000 aliaj polaj oficiroj estis murdita de la ruĝa armeo en la arbaro de Katyń (Pollando).

Danke al interkonsento kun Britio, en 1941 Sovetunio liberigis la du milionojn da polaj internigitaj civiluloj, kaj en 1942 Ada kun la patrino kaj la fratino rajtis veturi tra Samarkando al Persio, unue al Tehrano, poste al Isfahano, kie ŝi vizitadis polajn lernejojn ĉe la lokaj polaj setlejoj. Inter 1945 kaj januaro 1948 ŝi loĝis kun aliaj polaj rifuĝintoj en Libano, Bejruto; samjare ŝi plenumis kun siaj samklasanoj polan maturec-ekzamenon en Britio kaj novembre ŝi revenis al Pollando post okjara foresto.

Fininte la fakultaton pri slavistiko kaj specialiĝinte pri ĵurnalismo en la Universitato de Varsovio, Ada eklaboris ĉe eldonejo. En 1956, Julio Baghy gvidis kursojn en Varsovio kaj Ada estis ŝia fervora lernantino. Tiam komenciĝis ŝia amo al Esperanto.

En 1958, antaŭ la jubilea UK en Varsovio, ŝi estis vic-prezidantino de la Varsovia E-societo kaj kunfondis la Esperanto-redakcion de la Pola Radio: tiam ŝi ekkonis en la pola ĉefurbo sian estontan edzon, kiu kiel KKS loĝis konstante en la kongres-urbo por prepari la UK. En 1960 ŝi edziniĝis al G.C. Fighiera en Bruselo kaj la postan jaron kunlaboris kun li en la organizo de la UK en Harrogate (Britio).

En 1962 Ada transprenis de Teodor Jung la gazeton "Heroldo de Esperanto", kiun ŝi redaktis dum 36 jaroj ĝis sia forpaso: unue, dum 17 jaroj en Bruselo, poste, dum 9 jaroj en Madrido, fine, ek de 1988, en Torino.

Ada forpasis en la aĝo de 67 jaroj, en la kliniko Fornaca (Torino, Italio), kie ŝi kuŝis dum du monatoj pro nekuracebla malsano ĉe vertebroj kaj hepato. Ŝi ne konis la tipologion de la malsano kaj neniam suferis, danke al la kontraŭdoloraj terapioj al ŝi aplikataj. Ŝi estis flegata kaj asistata tagon kaj nokton seninterrompe.

Ĝis la fino ŝi restis optimisma, plene fidis al la kuracistoj, legis kaj intelekte aktivis. En sia lito ŝi skribis dekojn da leteroj al siaj parencoj kaj amikoj, fiksante rendevuojn en postaj datoj. Kelkajn tagojn antaŭ ol forpasi ŝi komencis verki artikolon, kaj petis la presprovojn de la kongresa numero de HdE por enpaĝigi ilin. Dum la funebra rito, sur la ĉerko troviĝis la pola kaj la Esperanta flagoj. Laŭ ŝia deziro la korpo estis cindrigita. La cindroj estas konservataj ĉe la cindrigejo de la ĉefa tombejo de Torino, fako A2, loko 24.

Ŝi partoprenis en grandega kvanto da internaciaj, naciaj kaj lokaj kongresoj kaj kunvenoj, ĉie aktivis, instruis kaj prelegis.

## Tipo A 3 – Ne esperanto moneroj kaj medaloj

Honoriga monero por Bertha von Suttner (1843-1914)







| | |
|---|---|
| Lando: Aŭstrio | Kvanto: nekonata |
| Metalo:niklo + latuno | Pezo: 8,5 gr |
| Diametro: 27,75 mm | Medalisto: Joseph Kaiser |
| Jaro: ekde 2002 | Diko: 2,10 mm |

### *Averso:*

En la mezo: busto de Bertha von Suttner; valoro 2 EURO; dato 2002

### *Reverso:*

Mezo: 2 EURO; mapo de Eŭropo; dekstre: dekoraĵoj

### *Rimarko 1:*




Ekzistas tipo kun la nomo B V Suttner sub la busto. Probable estas provmonero.

### *Rimarko 2:*


La monero havas noĉan randon kaj enskribojn en ĝi: inter grupetoj el tri steletoj troviĝas la vortgrupo "*2 EURO*", foje rekte, foje malrekte.

# Grafino Bertha von Suttner

**Bertha von SUTTNER** naskiĝis kiel Bertha Sophia Felicita Gräfin von Kinsky von Chinic und Tettau la 9-an de junio 1843. Ŝi mortis la 21-an de junio 1914. Ŝi estis aŭstra pacistino kaj verkistino.

Bertha von Suttner naskiĝis en Prago. Parton de la infanaĝo ŝi travivis en Brno kun la patrino Sofia ĉe sia zorganto, grafo Fürstenberg. En ŝia 13-a jaro ili transloĝiĝis al Vieno. Kiel juna virino ŝi laboris kiel edukistino en la familio *von Suttner* kaj enamiĝis al ties plej juna filo *Arthur von Suttner*. Sen la scio de la familianoj la paro geedziĝis en Vieno en la jaro 1875. La geedzoj dum naŭ jaroj (1876–1885) vivis en la Kaŭkazo kaj komencis vivteni sin per verkado.

Reveninte al Vieno Bertha von Suttner ekinteresiĝis pri pacifismaj temoj. En la jaro 1886 ŝi en Parizo rerenkontis la inventiston Alfred Nobel, kiun ŝi dek jarojn antaŭe ekkonis kaj kiu subtenis ŝiajn pacifismajn idealojn.




En 1887 ekestis ŝia kontraŭmilita romano *Die Waffen nieder!* ("For la batalilojn!"), kiu fariĝis la plej granda sukceso en ŝia literatura kariero. Komence pluraj eldonistoj rifuzis la eldonadon kaj nur en la jaro 1889 ĝi publikiĝis en tre malgranda eldonkvanto – kaj vendiĝis tiel bone, ke baldaŭ sekvis pliaj eldonoj kaj tradukoj al pluraj lingvoj.

En 1891 Bertha von Suttner instigis la fondon de la *Österreichische Friedensgesellschaft* (Aŭstra Societo de Pacamantoj), kies prezidantino ŝi fariĝis, kaj unu jaron poste ŝi fondis similan societon en Germanio. En 1905 ŝi gajnis la Premion Nobel de Paco. La 21-an de junio 1914 – mallonge antaŭ la komenco de la 1-a Mondmilito – ŝi mortis en Vieno.

Nobel-premiito pri paco Alfred Hermann Fried estis la plej intima kunlaborinto de Bertha von Suttner

La verko *Die Waffen nieder!* aperis ankaŭ en Esperanto sub titolo “For la batalilojn!”

Laŭ ŝia diro en telegramo al la Dresdena Esperanta Societo:” La pacifismo kaj Esperanto estas kuzoj.”

La diverslingvaj titoloj de la verko "For la batalilojn!" videblas sur la soklo de la monumento Bertha von Suttner en la korto de la Viena Pacomuzeo, Blutgasse 3, Vieno 1-a distrikto. Sur la soklo de la monumento fronte tre klare legeblas "For la batalilojn!".


Fonto: Vikipedio

“Kvankam ŝi ne lernis Esperanton pro sia granda aĝo, ŝi multe subtenis Esperanton, propagandis por ĝia disvastigo kaj persvadis eminentulojn eklerni ĝin.”

el “Esperanto-mono” p. 18 de Hans Jankowski.




Arĝenta aŭstra medalo pri kiu provizore mankas informoj.
















En 2004 aperis speciala eldono de Von Suttner-monero.

# *S P I K U M A Ĵ O J   K A J   S U P L E M E N T O J*

## *Klarigo de la titolo de ĉi-tiu nova rubriko*

*"Spikumaĵoj": aldonenda rubriko por informi pri numismatikaĵoj kiuj kompletigas jam priskribitaj objektoj. Per tiu vorto Ludovikito (Ito Kanzi) difinis nekonatajn leterojn de Zamenhof kiuj lin atingis post la finpreparo de de la Plena Originalaro (PVZ) kaj por kiuj li aranĝis en 1991 specialan angulon.*

*"Suplementoj ": kompletigantaj tekstoj aŭ tekstfragmentoj kun aldonaj informoj.*

- Itala Esperanto Kongreso 1976




Vidu ankaŭ: Jarkolekto1-numero2; p.4 por la medalo kun hoketo




La medalo sen hoketo havas la saman averson kiel la medalo de 1976, kun hoketo. Nia Hans Janskowski mencias nur la medalon kun hoketon, sed tamen montras medalon de 1976 sen hoketo.

Reverso: ĉirkaŭa teksto kun supre: "NACIA BIBLIOTEKO DE ESPERANTO"; sube: "DOTT; MARIO DAZZINI". Probable ĝi estas honoriga medalo.

- Pri la ora medalo 1912 sendis jenon nia Marc Vanden Bempt

***"Ehrenmedaille für Zamenhof"***

*Die NZZ schrieb: «Der Umstand, dass das Esperanto bereits auf ein Alter von 25 Jahren zurückblicken kann, hatte das Komitee bestimmt, dem Vater der Weltsprache eine goldene Ehrenmedaille prägen zu lassen.» Die Medaille wurde Zamenhof zusammen mit einem Blumenstrauss durch zwei Bernerinnen in der Tracht überreicht. Gemäss der «Berner Woche» scholl «ein unbeschreiblicher Jubel durch den Saal» im Casino. Auffallend stark war das weibliche Element vertreten, hielt das «Intelligenzblatt» fest.*

**"Honoriga medalo por Zamenhof"**

La NZZ raportis: "Tial ke Esperanto jam ekzistis 25 jarojn, la Komitato estis decidinta farigi oran honorigan medalon por la patro de la Mondlingvo". La medalo kaj bukedo estis enmanigitaj far du Bernaninoj en popolaj kostumoj. Laŭkutime dum la "Berna Semajno", "nepriskribeblaj ĝojkrioj resonis en la salono" en la Kazino. Frapis la okulojn la amaso da virinoj, laŭ la revuo "Intelligenzblatt". (esperantigis Bert Boon)

Vidu ankaŭ: http://www.derbund.ch/bern/stadt/Im-Zeichen-des-gruenen-Sterns/story/17190714

- Pri la helpa mono sendis eblan klarigon nia Hans Jankowski




Pri la 2 Esperanto- Mittagessen plaketoj mi supozas, ke unu de ili estis uzita dum la granda UEA-kongreso 1923 en Nürnberg al kiu partoprenis 4900 personoj kaj inflacio ĉiutage ŝanĝis prezojn.( Dum Augusto 1923 1 usona dolaro ŝanĝis komence je 1- fine je 8 milionoj da markoj.) La dua plaketo eble servis dum UEA-kongreso en Vieno 1924 kun pli ol 3000 partoprenantoj.


Vidu ankaŭ: Jarkolekto 2 numero 1; p. 9+10

**Korekto:** mi erare nomis la du manĝomonerojn "ĵetonoj". Laŭ PIV, "ĵetono" estas: "Disketo el metalo, plasto ks, uzata anst. monero, por funkciigi diversajn aparatojn (ekz. telefono), aŭ por kalkuli en monludoj." La du pagiloj do fakte estas "manĝomoneroj". Ĉu iu el vi konas pli taŭgan aŭ pli ofte uzatan terminon? Jankowski uzas la vorton "plaketoj".

# *H I S T O R I A J   A S P E K T O J*

## Speso kiel grundo de eŭro (2)

### B Speso: la unua neŭtrala, internacia monunuo




En majo 1907 la ĝeneva matematikisto René de Saussure (1868-1943) – frato de la pli fama lingvisto Ferdinand de Saussure – proponis enkondukon de internacia decimala monunuo.

Germana kemisto, loĝanta en Anglio, nome Herbert F. Höveler (1859-1918), adoptis tiun ideon de René. Li fondis en Londono – kun sidejo ĉe Merton Abbey- sub la pseŭdonimo E. Ĉefeĉ la “Ĉekbanko Esperantista”-n, kiu ebligis je favoraj kondiĉoj financajn transakciojn inter pli ol 40 landoj. Multaj pagoj tiel estis transkalkulitaj en la neŭtralan monunuon “Speso” aŭ “Spesmilo”. Do, 1 Spesmilo (Sm) = 10 Spescentoj (Sc) = 100 Spesdekoj (Sd) = 1000 Spesoj (Sp). Kial la nomon “speso”? René de Saussure eltiris el la franca vorto “espèce” la radikon “spes”.

La Spesmilo havis la saman valoron kiel 0,8 da karata oro (= 0,917 gr) aŭ 11/12 da pura oro, aŭ 0,733 gr da pura oro. Tio certigis ke la Spesmilo havis la saman valoron kaj transpageblecon de unu rublo, 2,5 francaj aŭ svisaj frankoj, duona usona dolaro kaj du britaj ŝilingoj.

La “Ĉekbanko Esperantista” kunlaboris kun la korespondantaj bankoj “Bankhaus Gebrüder Amholf” (Dresdeno/Germanio) kaj A. Saĥarov (Moskvo).

Ekde 1908 UEA propagandis la sistemon. Ĝiaj poŝtkartoj, por propra uzo kaj por uzo de siaj membroj, surhavis poŝtmarko-lokon kun indiko de postulata afranko, tio estis 4 spesdekoj.




Fine de la jaro 1914 la “Ĉekbanko Esperantista” administris la kontojn de 730 personoj en 43 landoj. Per specialaj ĉekoj, transpageblaj en Londono, transpagoj estis faritaj. Ekzistis ankaŭ ĉekoj laŭ formato 85x88 mm, redaktitaj nur en Esperanto kaj detranĉeblaj. Ili montris la sloganon: “Unu mondo, unu lingvo, unu mono”.

La koncepto de Spesmilo allogis la svisan “Schweizerischer Bankverein” en la jaro 1908 kaj poste ankaŭ bankon “Pictet” en Ĝenevo, kaj ambaŭ emisiis ĉekojn kun spesmila valoro en Esperanto.

Tiam la katalogoj pri revuabonoj kaj de librovendejoj, indikis prezojn en spesmiloj. Kotizoj kaj eĉ restoraciaj fakturoj dum Universalaj Kongresoj estis pagataj per ĉekoj.

Similaj al la tiam uzataj ĉekaroj (213x86 mm) ankaŭ ekzistis ĉekoj redaktitaj en Esperanto, tamen en la angla. Ili estis verdaj sur helverda fono. Tiel oni debetis sian konton. Estis malmultekosta sistemo por esperantistoj.

Pro la malficilaj kontaktoj dum la unua Mondmilito (1914-1918) multaj transakcioj nuliĝis. Post la morto de Höveler (1918) neniu plu kuraĝis daŭrigi la projekton. Ĉiuj kreditoroj estis repagitaj …

daŭrigota

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

# Reagoj kaj konversacioj

28.01.2015 9:13

Estimata samideano,

jes, mi ricevis la unuan numeron 2015. Mi dankas al vi.
Kore salutas vin Libuše Dvořáková, Ĉeĥio

28.01.2015 15:29

Kara samideanino,

Dankon pro via afabla respondo!

Ĉu vi eble konas aliajn esperantajn bibliotekojn aŭ muzeojn kiuj ŝatus ricevi nian internacian revuon?

Samideane,

Bert Boon

Iniciatinto de ENA

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

28.01.2015 19:58

Mi bone ricevis ĉi-numeron sed mankas la n-ro 3 de 2014. Ĉu vi povus ĝin sendi?

Elkore,

Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo Pérez
www.esperanto.es/biblioteko
biblioteko@esperanto.es

29.01.2015 15:36

Saluton Ana,

Tre volonte ni aldone sendas nun al vi la mankantan numeron 3 de 2014.

Gravas por nia sendoservo scii ĉu vi tute ne ricevis la trian.Vi ĉiam
rajtas tuj reagi kiam vi konstatas iun ajn mankon, ktp.

PS Ĉu vi eble konas asocion, bibliotekon aŭ muzeon en viaj regiono aŭ lando
kiu probable ankaŭ ŝatus ricevi nian revuon?

Kun amikaj salutoj,

Bert
Belgio

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

29.01.2015 10:02

Ĉar la 2015a temo estas 'la spesmilo-“moneroj” kaj la sur ili bazita
valutosistemo', mi intencas konigi la revuon tra la listo 'komerco', en
kiu eble estas interesitoj.

Ĉu vi ie interrete aperigas la kolekton de ENA? (Eble mi jam demandis,
sed estas tiom da aferoj por memori...)

Roland

29.01.2015 12:01

Saluton Roland,

Kaj pro manko de sperto kaj pro manka de tempo ĝis hodiaŭ mi ne povis
aperigi la revuon en la Interreto.

Kompreneble, ricevinte de vi retadres(ar)on mi tamen povus sendi la kolekton
al ĉiuj interesitaj personoj kaj grupoj, ktp

.
En iu ajn maniero vi rajtas (kiel membro kaj samredaktoro) diskonigi la
kolekton. Se vi estas spertulo pri aranĝo de diskonigaj retejoj, vi
evidente rajtas tiel kunlabori por disvastigi la revuon.

Dankon pro via tre interesa propono.

Bert

29.01.2015   13:08

La ĉijara temo de la revuo 'Esperanto Numismatiko' estas 'la spesmilo-“moneroj” kaj la sur ili bazita valutosistemo' (por bazaj informoj pri spesmilo vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/Spesmilo ).

Eble estas listanoj kiuj havas informojn aŭ dokumentojn pri tio. Ili bonvenas ĉe la redaktoro, Bert Boon (bert.boon@skynet.be). Je la sama adreso ankaŭ eblas peti senpagan specimenan numeron (pdf).
Roland Rotsaert

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

29.01.2015   14:40

Saluton Estimata Bert Boon

Laŭ la letero de Roland, eblas peti senpagan specimenan numeron (pdf) de "Esperanto Numismatiko".

Se jes, kun granda plezuro, mi ŝatus ricevi ĝin.
Mi antaŭdankas vin.
El Kongo DR
***Jean Bosco MALANDA LUTETE***
***Téléphone:*** *+243 810 295 081*
***Skype:*** *jbml1970*

29.01.2015   15:34

Estimata samideano,

Aldone mi sendas al vi la aktualan unuan numeron de la 2a jarkolekto(2015) de la revuo "Esperanta Numismatiko" .

En 2014 estis fondita la nova UEA-fakgrupo "Esperanto Numismatika Asocio"(ENA).
Per simpla perreta peto ĉiuj unuopaj personoj aŭ asocioj, bibliotekoj kaj muzeoj povas dumvive aliĝi senpage kaj senpage ricevi la 4 ĉiujarajn numerojn.  ENA estas sendependa asocio sen estraro. Do sen prezidanto, sen sekretario, sen kasisto ktp. Probable financrilate la plej malriĉa asocio en Esperantujo...

Se la alsendita numero plaĉus al vi, simple aliĝu kaj iĝu la 32 aŭ 33a individua membro de nia kreskanta asocio.

Altestime kaj samideane,

Bert Boon/ Belgio
Iniciatinto

29.01.2015 4:25 PM

Saluton Estimata,
Mi dankas vin pro la sendo de la dokumento. Mi legos trankvile hejme post la oficejo.
Ĉu vi povas sendi al mi la ligilon por aliĝi. Se ĝi estas en la sendita dokumento, mi malkovros.

Ghis baldaŭ

***Jean Bosco MALANDA LUTETE***
***éléphone:*** *+243 810 295 081*
***Skype:*** *jbml7190*

29.01.2015 16:42

Saluton Jean Bosco,

Por aliĝi oni nur bezonas sendi al mi retmesaĝon por diri: MI VOLAS ALIĜI. Vi tion ne plu devas fari ĉar via deziro por aliĝi jam estas tute klara.
Mi gratulas kaj salutas

samideane

Bert

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

30.01.2015 14:36

Kara samasociano Bert Boom,
Bonvolu sendi al mi la jarkolektojn Nr 1 kaj 2 la " Esperanta Numismatiko".

Hans Jankowski, Am Wemphof 5 De-44379 Dortmund, Germanio

30.01.2015 18:06

Kara Hans,

Mi ĝojas ricevi fine vivsignon de vi. Mi esperas ke vi ankoraŭ fartas sufiĉe bone.

Kompreneble mi tuj **aldone al ĉi-tiu reta respondo** sendas al vi la 1an jarkolekton kaj la novan, unuan numeron de la 2a jarkolekto.

Enkonduke pri ENA :

Lastan jaron mi fondis novan UEA-fakgrupon "Esperanto Numismatika Asocio"-n kun revuo "Esperanta Numismatiko". Tiu kiu **perrete** esprimas la deziron aliĝi, ricevas dumvivan membrecon tute senpage. Same la revuo kostas nenion!

ENA ne havas estraron, nur redakcion. Do ĝi havas nek prezidanton, nek sekretarion, nek kasiston. ENA do estas RETO kun en la mezo la redakcio. Ĝi **ne** havas poŝtadreson, nur retadreson: bert.boon@skynet.be. Ĝi do estas probable la nura asocio en Esperantujo sen

kaso, sen mono...***Pro tio ne eblas sendi aŭ ricevi ion perpoŝte, ĉar la iniciatinto ne akceptas pagi ajnajn kostojn el la propra poŝo.***

Ĉiuj membroj estas konsiderataj kiel tute samvaloraj rondo-anoj, kiuj rajtas, NE DEVAS, kunredakti la revuon kaj proponi necesajn ŝangojn aŭ plibonigojn.

Nuntempe, post unu jaro, ENA havas 34 membrojn, el kiuj kelkaj loĝas en aliaj kontinentoj (vidu en la revuo).

Kun amikaj kaj samideanaj salutoj,

Bert BOON
iniciatinto

1.02.2015 20:49

Kara Bert,
Dankon por via informo. Nun mi atendas la kajerojn por vidi ĉu tie estas montrataj moneroj kaj medaloj pri Esperanto kaj esperantistoj pri kiuj mi ne scias.
Laŭ informoj en la Verda Lupeo Jules Verne apartenis iam al Esperantogrupo en Amiens. Nun mi vidis ke Francio eldonis kelkajn grandajn kaj arĝentajn monerojn pri Jules Verne.
Kun amikaj salutoj de Hans Jankowski

02.02.2015 11:08

Kara Hans,

Vi skribas "Nun mi atendas la kajerojn...". Mi tamen jam sendis ilin kiel aldonoj de mia antaŭa retmesaĝo al vi, kaj en Word kaj en Pdf. Vi do mem malfermu ilin aŭ petu iun malfermi ilin por vi, por ke vi povu legi la 5 jam aperintajn numerojn.

Mi estas scivolema pri viaj rimarkoj kaj esperas ke vi povus doni al mi valorajn konsilojn.

Amike via

Bert

11.02.2015 22:29

Kara Bert,
Mi travidis, tralegis jarkolekto 2, Nr. 1 ĝis 15..01. **Pri la 2 Esperanto- Mittagessen plaketoj mi supozas, ke unu de ili estis uzita dum la granda UEA-kongreso 1923
en Nürnberg al kiu partoprenis 4900 personoj kaj inflacio ĉiutage ŝanĝis prezojn.**

**( Dum Augusto 1923  1 usona dolaro ŝanĝis komence je 1-  fine je 8 milionoj da  markoj.)  La  dua plaketo eble  servis dum  UEA-kongreso en Vieno 1924 kun pli ol 3000 partoprenantoj.**

**Janis Strupolis ne estas  litovo, sed  latvo el  Riga**. Mi posedas kelkajn de liaj Esperanto-medaloj. En jaro 1995 mi faris kajeron "Esperanto-Medaloj 1912 - 1995" ĉu vi posedas ghin?  Salutojn  al vi de Hans Jankowski

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

30.01.2015   12:11

Estimata s-ro Harmon,

Kiel vi fartas? Mi esperas ke bone!

Mi estas Bert Boon el Belgio. Ni jam konversaciis perrete: en 2009 mi sendis al vi leteron por peti informojn pri spesmilo-"moneroj" kaj vi afable respondis.

Nun miavice mi kontaktas vin por informi vin pri numismatika novaĵo en Esperantujo.

En 2014 mi fondis kiel novan fakgrupon ĉe UEA  **"Esperanto Numismatika Asocio"-n (ENA)** kun organo **"Esperanta Numismatiko".** (Vidu ankaŭ: Jarlibro 2014 p.70  ).La asocio ne havas estraron, do nek prezidanton, nek sekretarion, nek kasiston kaj nek poŝtadreson. Fakte financrilate la plej malriĉa esperanta asocio!

La aliĝo estas kaj restos dumvive senpaga, same por la (nur perreta) revuo. Por aliĝi sufiĉas sendi retan mesaĝon kun la deziro membriĝi.
Ĉiu membro estas konsiderata kiel ebla (ne deviga!) kunlaboranto kaj kunredaktoro.

Nun, komence de 2015, ni jam havas 33 membrojn el preskaŭ ĉiuj kontinentoj, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne el USONO!

Pro tio mi aldone sendas al vi (dankeme) la 1an numeron de la 2a jarkolekto (2015). Se ĝi plaĉus al vi, mi volonte sendos ankaŭ la kompletan 1an jarkolekton.

Se estas eble por vi, mi volus ankaŭ peti vin diskonigi la novaĵon inter la usonaj samideanoj. Mi ne dubas ke en USN  estas esperantistoj kiuj interesiĝas pri la helpa scienco de la historio, nome la numismatiko. Tiel kolektantoj kaj interesitoj povus malkovri la groton de Ali Baba en Esperantujo!

Atendante pacience vian respondon, mi salutas vin

kore kaj samideane

Bert Boon

Iniciatinto de ENA

30.01.2015 17:39

Elkoran dankon pro via mesaĝo kaj la alkroĉaĵo, kiun mi trovis interesega! Mi gratulas vin kaj dankas vin pro via iniciato krei la Esperantao Numismatika Associo.

Tre volonte mi estu membro. Kaj mi petas ke vi sendu la unuan jarkolekton. Mi ne plu aktiave kolektas, sed restas interesata pri numismatiko.

Mi transdonos erojn el la publikaĵo al la direktoro de la centra oficejo de Esperanto-USA, kaj al la redaktoro de Usona Esperantisto.

Samideane,

Vilĉjo Harmon

01.02.2015 13:34

Estimata sinjoro Harmon, kara Vilĉjo,

Dankon pro viaj afablaj vortoj. Mi ĝojas ke la projekto kaj la revuo plaĉas al vi.

Krome estas ĝojo kaj honoro povi bonvenigi vin kiel novan membron de ENA. Laŭ via deziro mi aldone sendas al vi la 1an jarkolekton, do la unuajn paŝojn de la nova "naskiĝinto"!

Dankon ke vi tuj agis kaj informis instancojn kiu povas sukcese diskonigi la novaĵon. Kompreneble mi revas pri sufiĉe multe da usonaj interesitoj.

Se vi mem iam volus sendi al la redakcia adreso ajnajn kontribuaĵojn, ili certe ricevos lokon en la bulteno. Viajn rimarkojn pri asocio kaj revuo mi volonte akceptos!

Mi esperas ke ENA paŝon post paŝo "plenigos" ĝis antaŭ nelonge ankoraŭ malplenan, forgesitan "niĉon" en la historio de Esperanto.

Kiam aperos artikolo pri ENA en la usona Esperanto gazetaro, ĉu vi povus sendi perrete al mi kopion por "Esperanta Numismatiko"? Mi anticipe dankas.

Amike kaj samideane,

Bert

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

29.01.2015 7:54 PM

Mia kara Bert, bonorde mi ricevis la revuon, kiun mi nun komencos plezure legi.

Amike, via Elda

29.01.2015 20:29

Kara Elda,

Mi esperas ke la legado plaĉis al vi. Bonan nokton!

Amike,

Alberto(Bert)

31.01.2015 18:33

Kara Alberto,

treege! Aparte interesa la artikolo: Speso kiel grundo de eŭro - mi atendas la daŭrigon!!!
Pri la terminaro: ĉu jam ekzistas numismatika terminaro? Se ne, danke al vi ja en prepara fazo!
Kompreneble, rimarkinda la artikolo pri "La spesmilo".

Nu, mi atente legis la revuon kaj pormomente ĝin arkivas en aparta ujo, pdf-formate. Eble ankaŭ mi iam decidos ĝin presi, por mia revua kolektaro, kiel intencas fari s-ro Utho. Por mi ĉiam pli alloga estas la papera versio ol la reta.

Plej amikajn salutojn sendas

Elda

1.02.2015 15:41

Saluton Elda!

Dankon pro via pozitiva reago!

Ĝis nun mi ne trovis verkon pri numismatika terminaro.Kelkajn klarigojn mi trovis en la Reto, en PIV aŭ alie. Aliajn, kiel "monerstampo" kaj "medalstampo" (Vidu la venontan alfabetan liston 5) mi devis mem klarigi esperante. La fina celo ( neniam kompletigebla) estos kompili ilin en standarda verko, farenda en la futuro.

Ankaŭ por mi numero estas nur finfarita kiam mi havas la paperan version en la mano.

Sed, pro la koncepto "sen estraro, sen administrado, sen kaso" nur perreta korespondado taŭgas. Tion mi devis denove klarigi al Hans Jankowski, kiu jam dufoje petis sendi paperan version. Ĉu mi pagu el propra poŝo? Jen strato senlima, senfina...

Amike via,

Alberto

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

06.02.2015 2:42 PM

Kara Bert,
>>
>> mi ricevis taskon de la ĉefino de Esperanto-muzeo Svitavy Libuŝe
>> Dvořáková verki por vi artikolon pri la nuna ekspozicio pri kolektado
>> kun fokusigo de la numismatka parto.
>>
>> Mi mem ne estas kolektanto (jes, mi volonte kolektus monbiletojn, sed
>> nur validajn!) tial ne temis pri simpla tasko, tamen mi estas obeema
>> knabo, do helpe de du kolektantoj, kiujn mi rete intervjuis, mi provis
>> fari miajn eblojn. La rezulton vi trovos en la formo de aldonaĵo.
>>
>> Mi petas vin, se fi faros redaktajn ŝanĝojn, sendi la artikolon antaŭ la
>> aperigo al mi aprobcele por povi aperigi ĝin sub mia nomo. Se vi
>> konsideros ĝin netaŭga por via periodaĵo, bv. sciigi tion al mi laŭeble
>> baldaŭ, ke mi povu ĝin oferti al alia gazeto.
>>
>> Amikajn salutojn al vi sendas Petro
>>
>> (Petr Chrdle, membro de la muzea grupo responderca pri la Internaciaj
>> rilatoj)

06.02.2015 17:54

Saluton kara Petro,
>
> Dankon pro via tre interesa kontribuaĵo por la revuo "Esperanta
> Numismatiko". Mi jam legis kaj relegis vian tekston kaj tute ne
> intencas ion ŝanĝi. Tiel vi prave povas mem "subskribi" ĝin kiel via
> propra verko.
>
> Tamen mi proponas ne uzi la 3an kaj la 4an aldonon, ĉar ili ne vere
> temas pri esperanta numismatiko. Ĉu vi konsentas pri tio aŭ ĉu vi
> havas propan motivon por aperigi ilin?
>
> Bonvolu ankaŭ danki en mia nomo la du sinjorojn kiuj estis
> intervjuitaj . Mi ankaŭ sincere petas ambaŭ sinjorojn havigi per vi
> sian retadreson, ĉar mi opinias ke ni povus interŝanĝi interesajn
> informojn pri esperantaj numismatikaĵoj se ili konsentus.
>
> Mi volas ankaŭ gratuli la kunlaborantojn de la Muzeo pro la organizo

> de la ekspozicio kaj mi tutkore deziras sukceson.
>
> Evidente mi ankaŭ ege dankas sinjorinon Libuše pro ŝia laŭdinda
> iniciativo peti vin verki artikolon por nia bulteno. Finfine mi ne
> forgesu danki vin, kara Petro!
>
> La artikolo kaj la du unuaj aldonoj aperos en la dua (aprila) numero
> de la 2a jarkolekto en la rubriko “Eventoj kaj anoncoj”.
>
> Kun amikaj kaj samideanaj salutoj el Belgio.
>
> Bert Boon
> Iniciatinto de Esperanto Numismatika Asocio(ENA)

6.02.2015 18:31

Kara Bert,

dankon por via tuja kaj tre afabla reago.

La retadreson de Vlastimil Kočvara vi trovos en kopilinio, de s-ro Richtr, kiun mi persone ne konas, venis respondoj ĉeĥe kaj mi devis traduki ilin, do mi dubas, ĉu lia Esperanto estas sufiĉa, ke li komprenu vin, sed tion certe scias Libuše.

Mi sendis al vi kvar fotografaĵojn kaj ne precize scias (kaj ne havas tempon serĉi) kiuj estas "la unuaj du", sed ja la elekto de ilustraĵoj dependas plene de la redaktoro, se vi uzos ĉiujn, aŭ neniun, aŭ du laŭ via elekto, kiel vi skribas, tio ne gravas por mi. Mi nur ĉiam volas vidi mian artikolon, se redaktoroj faras iujn redaktajn "plibonigojn", ĉar jam okazis al mi, ke la redaktoraj intervenoj komplete ŝanĝis la sencon de la artikolo (ne nur en Esperantujo, ankaŭ en la ĉeĥa kaj la angla tio okazis al mi). Nur pro tio mi havis la kondiĉon vidi la eventualajn ŝanĝojn de mia teksto antaŭ la preso. Nu, se vi akceptas ĝin tiel, kiel mi sendis ĝin al vi, tiukaze estas ĉio en ordo.

Amikajn salutojn al vi kaj per kopio al Liba kaj Vlastík (karesnomoj) sendas Petro

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

8.02.2015   16:25

Dag Bert,

Ik stootte toevallig op dit artikel:
http://www.derbund.ch/bern/stadt/Im-Zeichen-des-gruenen-Sterns/story/17190714

Het zal je misschien wel interesseren, omwille van deze passage:

Die NZZ schrieb: «Der Umstand, dass das Esperanto bereits auf ein Alter von 25 Jahren zurückblicken kann, hatte das Komitee bestimmt, dem Vater der Weltsprache eine goldene Ehrenmedaille prägen zu lassen.» Die Medaille wurde Zamenhof zusammen mit einem Blumenstrauss durch zwei Bernerinnen in der Tracht überreicht. Gemäss der «Berner Woche» scholl «ein unbeschreiblicher Jubel durch den Saal» im Casino. Auffallend stark war das weibliche Element vertreten, hielt das «Intelligenzblatt» fest.

Amike,

Marc

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

12.03.2015   3:31 PM

Kara Bert,

Mi nun faras la afiŝojn por la asocioj ĉe la Movada Foiro, kaj mi volas fari tion ankaŭ por Esperanto Numismatika Asocio. Verŝajne mi ne estas la unua homo, kiu atentigas vin, ke la nomo de la asocio ne estas gramatike absolute ĝusta. La vorto Esperanto estas substantivo, sed substantivo ne povas funkcii kiel adjektivo. Ĝi povas esti la unua parto de kunmetaĵo, ekz. Esperanto-Asocio, Esperanto-kongreso, sed en tia okazo necesas streketo por ligi ĝin al la posta vorto. Esperanto-Numismatiko estus ĝusta, aŭ Esperanto-Numismatika Asocio, sed tio signifus, ke temas pri Esperanta numismatiko (t.e. okupiĝo pri Esperantaj moneroj).

Fakte, ŝajnas al mi ke la sola gramatike ĝusta formo, se oni ne volus komplete rearanĝi la nomon de la asocio, estus Esperanta Numismatika Asocio, alivorte ke la unua vorto fariĝu adjektivo. Ĉu vi konsentas, ke mi tiel korektu la nomon sur la afiŝo?

Kore,
Anna

12.03.2015 18:55

Kara Anna,

Dankon pro via prava rimarko pri la nomo de nia asocio. Mi jam ekde la komenco forgesis la streketon sed estis malkonscia pri la eraro, ĉar ĝis hodiaŭ NENIU atentigis min pri tiu eraro. En tiu kazo mi jam delonge estus ŝanghinta ĝin! Do mi tre danke konsentas kun vi pri definitiva ŝanĝo.

Ĉar "ENA" fakte signifas ke temas nur pri Esperanta numismatiko- do ne pri ĝenerala numismatiko, malgraŭ artikoloj pri la historio de ĝenerala numismatiko ktp.
Do, surbaze de mia koncepto antaŭ la fondo de ENA, la nura kaj gramatike kaj koncepte korekta nomo estas kaj estos Esperanto-Numismatika Asocio.

Ne malfacilos estoncece aldoni streketon kaj klarigi al la membraro kial la nomo iomete ŝanĝis. Mi supozas ke mi rajtas publikigi vian leteron kaj mian respondon en nia venonta bulteno, ĉar " ricevus la avenon la ĉevalo kiu pli meritas ĝin".

Mi deziras al vi multan inspiraĵon dum la kreado de la afiŝoj kaj multan sukceson. Se eblus, mi petus 1 ekzempleron por la revuo kaj poste por mia kolekto.

Kore kaj amike,

Bert

13 .03.2015 10:13

Kara Bert,

Mi miras, ke neniu atentigis vin pri la manko de streketo ĝis nun, kvankam mi scias, ke tio estas relative ofta eraro. Mi estas iom ŝokita, ke la nomo eĉ aperas en la Jarlibro de UEA sen korekto! Kompreneble mi konsentas, ke mia letero aperu en via revuo.

Mi fakte supozis, ke via asocio okupiĝas pri ĝenerala numismatiko, ne nur pri Esperanta, sed ĉar vi efektive okupiĝas pri Esperanta numismatiko, sufiĉos aldoni streketon al la nomo de la asocio. Tio estas tre malgranda ŝanĝo, kiun la homoj apenaŭ rimarkos.

La afiŝoj por la Movada Foiro ne estas io tre ekscita. Mi simple aperigas la nomojn de la asocioj per grandaj literoj sur folioj A4, por ke la publiko facile vidu, kiu asocio troviĝas ĉe ĉiu tablo. Mi tuj aldonas la vian (kun la streketo!) al ĉi tiu mesaĝo.

Cetere, mi scias, ke nun oni pretigas la Jarlibron por 2015. Eble ne estus tro malfrue por informi pri la korekto.

Kore,
Anna

13 .03.2015 17:00

Saluton kara Anna,

Mi tuj sendis al UEA.org la peton aldoni streketon en la nova Jarlibro. Espereble ne vane!

Fine mi tutkore dankas vin pro ĉio, antaŭĝojante jam pri nia baldaŭa renkontiĝo en Lille.

Amike,

Bert

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Pasko 2015

Kara Alberto,

En Internet, ui rigardis la informojn kiujn vi donis pri medaloj. Vi demandis pri mezuroj de kelkaj latvaj medaloj. En jaro 1995 mi faris katalogon, pri ĉiuj Esperanto-medaloj ĝis tiam konataj al mi kaj 2000 mi verkis libreton pri Esperanto-Mono. La libreton vi supozeble posedas (tiam donu la sendatan al alia kolektanto). Pri "Esperanto-Medaloj" vi eble ne scias. Tial mi sendas kopion al vi.

Nenion resendu, sed eble en Internet informu pri ricevu, hansjankowski1@gmail.com.

Ankaŭ post eldono de tiiuj kajeroj, mi daŭrigis kolekti informojn pri Esp.medaloj, moneroj, pm, ktp, sed mi ne plu aĉetas multekostajn medalojn aŭ poŝtaĵojn.

Rilate al viaj demandoj. Kiam 1907/08 esperantistoj elpensis spesmilo-sistemo la modelo estis la portugala Milreis-sistemo kaj ekde komence ili celis ke tiu sistemo estu mondvaste uzata (eble ne tuj per medalaj moneroj). Tiun pruvas la internacia pagosistemo per ĉekoj kaj bankkontoj en diversaj ŝtatoj kaj la Universala Spesmila Banko 1927.

Ĵus mi revenis de vojaĝo el la Vaska Lando, Bilbaon, Santander kaj miris, ke multo estas pli bona en tiu regiono ol ĉe ni, kie mi loĝas. Jam mi estas maljuna 86 kaj fariĝis malrapida. Mi kunsendas 6 fotokartoj pri medaloj. Eble vi povas montri ilin en Internet.

Karajn salutojn de

Hans Jankowski

La 25an de aprilo 2015

Mia kara Hans,

Vi vere agrable surprizis min per via letero de Pasko 2015 kaj per la interesa enhavo de la koverto, pro kio mi tutkore dankas vin.

La fotojn pri medaloj mi certe uzos en la rubriko “Moneroj kaj Medaloj”, ĉar la informojn mi trovis en unu el viaj libretoj.

Mia aktuala problemo estas, ke mi en la revuo ne povas montri en koloroj la diversajn objektojn, kiel ĉekoj ktp., ĉar en viaj libretoj ili evidente ankoraŭ estis nigraj-blankaj.

Mi supozas, ke vi konas personon kiu kapablus skani per kompulilo la bildojn kiujn vi havas en kolora versio por sendi ilin al mia retadreso. Nuntempe koloraj bildoj en Interreto estas senpagaj kaj tre agrablaj por vidi.

La rektangulan medalon pri kiu vi sendis al mi kolorajn fotojn kaj pri kiu mi trovis informojn en suplemento en libreto, mi prirtaktos kiel unuan por la temo “Kuracistoj kaj UMEA”, en la tria  numero de la ENA-revuo 2015, kune kun tri UMEA-medaloj. Kompreneble mi mencios vian nomon.

Ĉu vi ankoraŭ kapablus partopreni en la jubilea kongreso en Lillo? Mi esperas ke jes, ĉar mi deziras denove revidi vin post tiom da jaroj por interparoli pri nia komuna “amo” por numismatikaĵoj.

Amikajn salutojn de

Bert

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

21.04.2015   17:12

Saluton Bert,

Mi supozas ke vi jam konas/havas la libreton de Jankowski pri Esperantomono? (vidu apude)
Se ne, mi volonte skanos ĝin por vi.

Amike,

Marc



21.04.2015   18:08

Saluton Marc,




Mi ĵus kontrolis, kaj trovis en mia biblioteko libreton kun la apude montrata kovrilo. Ĝi havas la saman titolon, sed probable estas pli aktuala.
La bildoj sur via kovrilo ankaŭ troviĝas en mia eldono.
Sur la unua paĝo estis aldonita: "Ilustrita historio pri universala monosistemo/ Dua kaj kompletigita eldono" Do verŝajne vi posedas la unuan eldonon.Gratulon!
Mi volonte akceptas vian proponon skani kaj sendi ĝin al mi.

Mi anticipe dankas vin kaj salutas vin

amike.

Bert

# Numismatika ekspozicio en Esperanto-muzeo en Svitavy



La historio de la Esperanto-muzeo estas mallonga: Ĝi estis inaŭgurita en la jaro 2008. Tamen ĝi jam havas sian neanstataŭigeblan lokon inter la ĉeĥaj muzeoj kaj ankaŭ inter la Esperanto-muzeoj en la mondo. Krom la ĉiujare ŝanĝataj ekspozicioj kun Esperanto temaro kaj klasika deponejo ĝi estas loko, kie oni organizas aranĝojn kaj por esperantistoj, kaj por la ĝenerala publiko. Ĝi posedas ankaŭ ampleksan bibliotekon de libroj kaj gazetoj skribitaj en Esperanto, sed ankaŭ de ĉeĥaj (kaj iuj aliaj nacilingvaj) libroj tradukitaj el Esperanto.

Krom la parto de la ekspozicejo, montranta koncize la historion de la Esperanto-movado, jam okazis tie 7 portempaj ekspozicioj, plejofte ili daŭris unu jaron. Momente en la muzeo okazas jam la oka ekspozicio, kies temo *Esperanto kaj kolektado* havas du partojn: *Esperanto-kolektoj* kaj *Kion kolektas la esperantistoj*. Ĝia inaŭguro estis kunigita kun tutŝtata filatela ekspozicio en la Urba Muzeo kaj Galerio. Okaze de tiu filatela ekspozicio estis eldonitaj du gravaj artefaktoj, ambaŭ laboraĵoj de esperantistoj: Porokaza bildkarto kun desegnaĵo de la ilustristino kaj esperantistino Miroslava Tomečková kaj poŝtmarko kun alpresaĵo proponita de la humuristo, ilustristo kaj esperantisto Pavel Rak, sur kiu estas la Esperanto-muzeo (kaj la bildo, kaj la teksto).

Estas klare, ke ĝi enhavas ankaŭ kolektaĵojn el la fakoj de numismatiko kaj parencaj, kiel notafilio (kolekto de monbiletoj) kaj faleristiko (medaloj kaj insignoj).

Jan Richtr, unu el la organizantoj de la ekspozicio, konatigis nin kun la numismatika parto de la ekspozicio:

*En la ekspozicio estas videblaj moneroj el diversaj landoj de la tuta mondo. Moneroj estas ne nur iloj por financaj transakcioj, sed ankaŭ historiaj atestantoj de la koncerna tempo, arta teknologio kaj nacia simboliko. Sur la moneroj ni povas trovi reprezentantojn de ŝtatoj, vegetalajn kaj animalajn motivojn, ŝtatsimbolojn kaj specimenojn de naciaj lingvoj.*

*Numismatiko estas tre malnova kolektaĵfako. Monerojn oni kolektas jam ekde la antikva epoko ĝis nun. Ekzistas kolektantoj, kiuj specialigas sin al moneroj el oro kaj arĝento, aliaj specialiĝas al*

*difinita tempoperiodo, teritorio, motivoj, ktp.*

*Multaj kolektantoj komencis kolekti monerojn same kiel mi: La bazo de la kolekto fariĝis moneroj kunportitaj el vojaĝoj, plejparte etvaloraj. Kaj ĝin oni plivastigas per kolektitaĵoj de unuopaj tempoperiodoj. Ja ĝojon oni sentas ĉe ĉiu nova ekzemplero.*

*Kiel interesaĵon mi menciu, ke en Svitavy estis trovita granda trezoro dum la rekonstruo de historiaj domoj en la ĉefa placo: Bareloj plenigitaj de arĝentaj moneroj. Ili nun estas konservitaj en Moravia muzeo en Brno.*

La plej ampleksaj kolektaĵoj estas tiuj de Vlastimil Kočvara (iama prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio) kaj Jan Richtr (rigardu la bildojn).

Mi donis al ambaŭ kelkajn personajn demandojn kaj jen iliaj respondoj; la unua intervjuito estas denove la jam menciita J. Richtr:

Kiom da moneroj el kiom da ŝtatoj vi posedas?

*La demandon kiom da moneroj el kiom da ŝtatoj oni ne povas precize respondi. Ja multaj ŝtatoj ne plu ekzistas kaj en pasinteco stampis la monerojn ne nur ŝtatoj, sed ankaŭ regnestroj kaj aliaj suverenoj. Se mi devus pritaksi, el kiom da nunaj landoj, ĝi estus proksimume 150.*

Kian moneron vi estimas pleje?

*Ĉiu monero estas por mi iel interesa. Klare, la plej interesaj estas la plej antikvaj moneroj el jam perdiĝintaj antikvaj kaj mezepokaj ŝtatoj. Ekzemple en la ekspozicio estas montrita monero el kupro proksimume 1700 jarojn malnova. La unuaj moneroj en Eŭropo estis produktitaj el oro kaj arĝento, se ni ne konsideros la antaŭmonerajn pagilojn. Komprenu, ĉiu monero estas iuspeca defio. Ricevinte malnovan moneron, oni strebas ekscii, el kiu tempo ĝi devenas, de kiu regiono, kia estas ĝia sorto. Necesas serĉi en literaturo, interreto, deĉifri malnovan ofte damaĝitan skribon, transformi malnovan jarnumeron, serĉi konsilojn ĉe kolegoj – kaj tiel oni konatiĝas kun interesa historio. Povas daŭri kelkajn monatojn, ĝis eblas ekscii la bezonatajn datumojn.*

Post tiuj tre interesaj respondoj de Jan Richtr mi turniĝis al Vlastimil Kočvara, kiu okupiĝas pri la kolektado de Esperanto-motivoj. Jen:

Mi konas vin kiel fervoran esperantiston. Kiu el tiuj du viaj hobioj, kolektado kaj Esperanto, kaptis vin pli frue?

*Min mem, esperantisto de junaĝo, allogis numismatikaĵoj nur en mia plenkreskula vivoepoko, tamen mi sukcecis krei interesan ĝeneralan kolektaĵon. Kompreneble, ke ĝi grandparte rilatas al mia dumviva hobio – Esperanto.*

Ĉu eblas koncize klarigi, kiel vi organizas vian kolektaĵon?

*Ĝis nun mi nenie renkontis ian difinon, en kiujn kategoriojn oni ordigu la esperantotemajn numismatikaĵojn (en pli granda senco de la vorto). Eble tial, ĉar numismatikoj en miatempa verda familio ankoraŭ ne organiziĝis. Eble tio ŝanĝiĝas nun.*

*Por klare priskribi ĉiun numismatikan eron mi difinis jenajn kategoriojn:*

- *a/ Moneroj oficiale emisiitaj de ŝtataj institucioj*
- *b/ Internaciaj moneroj eldonitaj de privataj bankoj (ili ne havis validecon, sed esperantistoj ilin sporade uzadis inter si kiel pagilon)*
- *c/ Medaloj eldonitaj de Esperanto-organizaĵoj okaze al diversaj jubileoj aŭ renkontiĝoj*
- *d/ Honormedaloj kaj ordenoj*

*e/ Insignoj*

*f/ Paperaj monbiletoj*

Kiujn erojn el via kolekto oni povas nun admiri en Sviatvy?

*El la supre menciitaj kategorioj mi al la Esperanto-muzeo en Svitavy por la ekspozicio pruntedonis jenajn numismatikaĵojn:*




*a/*

1. *Pollando, arĝenta monero 100 zlotoj, 1979, kun la portreto de L. L. Zamenhof.*
2. *Kubo, ordinara monero 1 peso, 1990, Averso: La terglobo, ĉirkaŭfrazo: Universala kongreso de Esperanto. Dorso: portreto de Zamenhof*
3. *Kroatio: ordinara (arĝenta) monero 25 kuna, 1997. Averso: La blazonŝildo de Kroatio, ĉirkaŭfrazo en nacia lingvo kaj en Esperanto: La unua kongreso de kroataj esperantistoj.*

*b/*

1. *Spesmilo, arĝenta monero emisiita de la Ĉekbanko Esperantista (Svisujo), 1912. La eldonon iniciatis R. de Saussure.*
2. *10 steloj, emisiis Universala Ligo, Nederlando, 1959. La tria en vico de la planita internacia monerosistemo.*

*c/*

1. *Esperantista Kultura Festivalo (100 jaroj de P. Bezruč), eldonis la organizinto de la festivalo: Esperanto-klubo en Opava, Ĉeĥoslovakio, 1967*
2. *Universala Esperanto Kongreso, Varna 1978. Eldonis Mondpaca Esperanto-movado laŭ projekto de esperantisto prof. Hradecký, Jablonec, Ĉeĥoslovakio.*
3. *Porpaca marŝo, Jablonec, Ĉeĥoslovakio, 1987, eldonis Esperanto-klubo en Jablonec, iniciate de prof. Hradecký.*
4. *11-a ĝenerala konferenco de MEM, Budapeŝto, 1988. Emisiis Ĉeĥa Esperanto Asocio, eble iniciate de prof. Hradecký.*
5. *Esperanto 1887 – 1987. Emisiis Ĉeĥa Esperanto Asocio, 1987, laŭ projekto de la eminenta ĉeĥa skulptisto prof. Jiří Harcuba (esperantisto).*
6. *100 jaroj de UMEA – 16-a IMEK, Krakovo, Pollando. Emisiis UMEA, Krakovo 2008.*
7. *Iniciatoro de Esperanto, dr. L. L. Zamenhof 1859-1917. Gisita medalo kun Zamenhofa portreto. Detaloj ne konataj.*

*d/*

1. *Honor-insigno por meritoj de MEM. Emiisiis MEM, la projekton probable faris prof. Hradecký.*

Mi dankas al vi ambaŭ pro viaj respondoj.

Petro Chrdle

Fotis: Matěj Nárožný

# La 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio

25 de julio — 1 de aŭgusto 2015

Dato: **sabaton, la 25-an de Julio 2015.**

Komenchoro: **la 19h00.**

Loko: **La vasta halo ĉe la interetaĝo de la kongresejo**.

# INVITO

## *por ĉiuj ENA-membroj kaj interesiĝantoj!*

Bedaŭrinde nek niaj amikoj-filatelistaj, nek ni, numismatoj, sukcesis rezervi salonon senpagan por saluti kaj bonvenigi niajn membrojn.

Do, ni nun invitas niajn geamikojn ĉe niaj (probable apudaj) standoj kaj proponos **per afiŝoj** alian daton por kunveno.